

# Eŭropa Bulteno

Majo 2010, N° 5 (94)

- [La estraro de EEU aktivis en Kaiserslautern](#)
- [Esperanto-Wikipedio ricevis rekonon pro kresko](#)
- [Profesia dokumenta filmo pri E-movado](#)
- [Wikitrans – Epokfara novaĵo](#)
- [Beneluksa Esperanto-Kongreso](#)
- [Informado en Esperanto pri aktualaĵoj en la Eŭropa Unio](#)
- [Franc-Germana E-Kongreso en Kaiserslautern](#)
- [Virtuala renkontiĝo de infanoj lernantaj E-on](#)
- [Hungaraj infanoj vizitis Francion](#)

## LA ESTRARO DE EEU AKTIVIS EN KAISERSLAUTERN

La 21-an de majo, dum la komuna german-franca E-kongreso en germana urbo Kaiserslautern devus okazi asemblea kunsido de EEU. Ĉar mankis kvorumo (ĉeestis nur 5 delegitoj) oni akceptis la decidon peti asembleanojn konfirmi la raportojn per interreta voĉdonado, kio intertempe okazis kaj la financaj kaj labora raportoj estas ekceptitaj. Poste okazis eŭropa konferenco Eŭropaj valoroj kaj simboloj en kiu Maja Tiŝljar legis referaĵon de Umberto Broccatelli, aparte skribita por la konferenco pri evoluo de la eŭropa ideo kaj kiel ekestis la Eŭropa himno. Sekvis prelego de Sean O Riain pri la graveco de teksto en kiu ajn himno kaj ŝanco kiun donas al Esperanto la teksto de la himno originale verkita en nia lingvo. Fine mi prelegis pri Eŭropaj valoroj: 12 valoroj difinitaj de eŭropa projekto Eŭropajn valorojn peri. Estis montrita nova paĝaro de Asocio por Eŭropa Konscio (ne ankoraŭ plene finita) kiu reprezentas ĝuste tion: Eŭropajn valorojn kaj simbolojn kaj tekstojn en 24 lingvoj (23 oficialaj plus Esperanto). ([www.wix.com/dtisljar/europo](http://www.wix.com/dtisljar/europo)).



Sekvis kunveno publika en kiu ĉiuj interesitoj povis levi temon aŭ demandi pri laboro de EEU ene de kiu la estraro prezentis ankaŭ la laborplanon de EEU por 2010.

Tute fine de la tago okazis ankoraŭ kunveno inter po tri reprezentantoj de EEU kaj Hamburga E-Societo dum kiu ni pridiskutis la staton de preparoj de la Eŭropa Konferenco en Hamburgo kaj difinis pliajn paŝojn por ĝi.

Tiusence oni povas diri ke la preparoj tre bone progresas. Ni jam

havas konfirmon de la partopreno de la eksa ŝtatprezidanto de Kroatio kaj komencajn kontaktojn kun pluraj aliaj eksprezidantoj. En ekonomika sekcio jam aliĝis kelkaj gravaj ekonomikistoj. Okazis kontaktoj kun aro da neregistraj organizoj kaj la nuna fazo postulas oficialigon de la konferenco en la urba administracio de Hamburgo, kiun taskon transprenis la prezidanto de Hamburga E-Societo Juergen Wulf.

*Zlatko Tišljar*

## Esperanto-vikipedio ricevis rekonon pro kresko

La Esperanto-vikipedio ricevis rekonon pro la plej granda kresko de la mil "havendaj artikoloj" dum la pasinta monato aprilo 2010. En tiu listo enestas la temoj, kiuj laŭ la vikipedio-kunlaborantoj nepre enestu en ĉiu vikipedio; enestas ankaŭ Esperanto, inter entute 18 lingvoj.

Esperanto estas nun kun unua loko menciata sur la paĝo, kie oni sekvas la plej grandajn kreskojn de tiuj artikoloj en unuopaj vikipedioj, [http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles/Growth#eo\\_Esperanto](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles/Growth#eo_Esperanto)

En komparo kun la aliaj lingvoj Esperanto antaŭeniris dum aprilo de la 37-a loko al la 33-a, [http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles) .

Tiu kresko estas la plej videbla sukceso de la ĵusa "Monato de Vikipedio", kiun survoĵigis Marek Blahuš kadre de E @ I.

Akompanis la kampanjon konkurso, en kiu partoprenis laŭ <http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Konkurso> entute 28 vikipediaj kunlaborantoj. La rezulton de la konkurso oni aperigos fine de majo.

Jen la listo de la mil havendaj artikoloj, [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Listo\\_de\\_havendaj\\_artikoloj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Listo_de_havendaj_artikoloj)

Vikipedio havas nun 128 809 artikolojn kaj okupas la 22an lokon en la listo de ĉiuj Wikipedia-enciklopedioj ordigitaj laŭ nombro da artikoloj ĉe [http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias) sed estas risiko, ke la dana, kun 128 272 artikoloj, forprenu baldaŭ tiun lokon... Vekiĝu !

Esperanto okupas la unuan lokon inter la konstruitaj lingvoj ĉe

[http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_language\\_family](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_language_family)

Volapuko, kiu momente fulmrapide progresis pro trompa uzo de robotoj, estas en dua loko.

En listo laŭ nombro de parolantoj por unu artikolo

[http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_speakers\\_per\\_article#cite\\_note-et-0](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_speakers_per_article#cite_note-et-0)

aperas ke volapuko havas plej malmulte da parolantoj : 30, kaj 0 (nulo) parolanto po artikolo ;-)

Esperanto aperas poste kun taksita nombro de 2 milionoj da parolantoj kaj 15,7 parolantoj po artikolo (konsultu pli ofte Vikipedion, kaj kaptu la okazon por sugesti plibonigojn !).

Pliaj kontribuantoj estas necesaj, ne nur por pluteni tiun lokon (estos malfacile gajni la 21an, kie la korea havas 134 493 artikolojn) sed, krom la nombro kaj pozicio, gravas la informriĉeco, fideco kaj kvalito de la artikoloj laŭ enhavo, lingvouzo, aspekto (ilustraĵoj), referencoj, ligiloj, ktp.

Informu viajn verkemajn kursanojn, klubanojn, asociajn membrojn, kiuj havas enciklopedian spiriton, profundan konon de difinita fako, por instigi ilin al partopreno en tiu giganta entrepreno ! Vidu la kategoriojn ĉe

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:%C4%88io>

## *Lu Wunsch-Rolshoven*

---

### **PROFESIA DOKUMENTA FILMO PRI E-MOVADO**

Kelkmil homoj, multaj spertuloj pri filmoj, jam vidis la novan profesion filmon pri Esperanto kaj idealismo pli ĝenerale (kaj miloj pliaj legis pri ĝi). Jen kelkminuta eltranĉaĵo/eltiraĵo, kiun mi vidis kun granda ekcitiĝo.

<http://vimeo.com/10903101>

Eble jam venis la tempon danki Sam Green, la reĝisoro. Mi jam korespondis kun li plurfoje. En mia lasta korespondaĵo kun Sam, li informis ke post la famaj kaj jamaj film-festivaloj en Sundance kaj San Francisko li esperas ke miloj de Novjorkanoj venos vidi ĝin. Neformala kontrakto estis onterkonsentita por The Kitchen, spektaklejo en Novjorko por oktobro 2010.

Sam Green ([http://en.wikipedia.org/wiki/Sam\\_Green](http://en.wikipedia.org/wiki/Sam_Green)) estas alte premiita dokumentisto. Li produktis la filmon, Utopia in Four Movements kun pluraj subvencioj, i.a. kun subteno kaj kontakto kun Humphrey Tonkin kaj Esperantic Studies Foundation (<http://www.esperantic.org>)

## *Neil Blonstein*

---

### **WikiTrans – epokfara novaĵo**

Malgrnda dana firmao (vidu la sekvan artikolon) ellaboris elektronikan programaron por aŭtomata tradukado el la angla en Esperanton, kun la celo traduki la tutan anglalingvan vikipedion, kiu estas kun 3,3 milionoj da artikoloj absolute la plej ampleksa vikipedio. (Sekvas la germanlingva kun iom pli ol unu miliono kaj la feranlingva nun proksima al unu miliono). La grandiozeco de la sukceso kies ĉefaŭtoro estas Eckhard Bick estas ke la maŝino tradukas kun kvalito pluroble pli bona ol iu ajn alia ĝisnuna tradukilo el la angla al Esperanto. La tradukitaj tekstoj enhavas erarojn sed preskaŭ ne eblas trovi frazon kiun oni ne povus kompreni el la kunteksto. Nun la maŝino jam tradukis pli ol 600.000 artikolojn kun 2-3 milionoj da paĝoj! Kaj ĝi kapablas traduki pli ol 10.000 artikolojn tage!! Kontrolu mem ĉe [www.epo.wikitrans.net](http://www.epo.wikitrans.net). Mi persone nun jam ne plu uzas esperantan vikipedion, ĉar en WikiTrans estas multe pli da artikoloj kaj ankaŭ tiuj kiuj troviĝas en la Esperanta vikipedio estas en WikiTrans multe pli ampleksaj.

Mi kredas ke la administrantoj de la Esperanta vikipedio devus laŭeble urĝe interkonsenti kun la dana firmao enmeti la artikolaron de WikiTrans al la esperanta vikipedio kaj tiel tuj havi la 4-an pozicion inter vikipedioj kaj post kelkaj montaoj la 1-an!! Ĉar kiam la maŝino tradukos ĉiujn 3,3milionojn da anglalingvaj artikoloj aldoniĝos al ĝi la jam ekzistantaj 130.000 de la nuna Esperanta vikipedio kaj tiel ĝi iĝos la plej granda en la mondo.

Mi kredas ke tion oni ne povos ne riamrki kaj la reputacio de Esperanto grave altiĝus. Homoj nekonantaj la anglan kaj havante en siaj lingvoj malgrandajn vikipediojn verŝajne ekinteresiĝus por lerni Esperanton kaj por povi uzi tiun E-an vikipedion. Mi invitas administrantojn de esperanta vikipedio tuj ekstrakti tiun aferon kun la dana firmao kaj sinjoro Bick, kiu jam diris al mi ke por tio li ne starigas iujn ajn kondiĉojn. Li mem proponis kiel fari tion signnte ĉiujn artikolojn de Wikitrans kiel aŭtomattradukitaj.

## *Zlatko Tišljarić*

---

# WikiTrans Esperanto

Bonvenon al la Esperanta sekcio de WikiTrans. Ĉi tie vi povas serĉi en esperantlingva versio de la angla Vikipedio, jam kovrante pli ol 600.000 plej uzatajn artikolojn, sed baldaŭ inter pli ol 3 milionoj da artikoloj. WikiTrans trovas serĉesprimojn ne nur kiel kapvortojn, sed ankaŭ ene de artikolo, kaj tial unue montros al vi paĝon kun ordigitaj trovoj, laŭ verŝajneco, por disambiguigo.

469477 artikoloj tradukitaj | [Foliumu](#)

La WikiTrans-projekto estas esplor- kaj evoluigo-projekto de la dana lingvoteknologio-firmao GrammarSoft ApS, kunlabore kun University of Southern Denmark (Suddana Universitato). La ĉefa celo de la projekto estas permesi trans-lingvan uzadon de Vikipedio-artikoloj, pere de paralela tradukita retejo.

Unuavice la ideo estas oferti aliron al la plej granda Vikipedio de ĉiuj - la angla, kun pli ol 3 milionoj da artikoloj - en Esperanto kaj la dana. Kvankam ambaŭ lingvoj estas inter la pli grandaj Vikipedioj, iliaj po ~ 130.000 artikoloj konsistigas nur modestan kolekton kompare al tio kio haveblas en la angla. Krome, la individuaj artikoloj estas ofte multe pli malgrandaj ol iliaj anglaj analogoj, malpli dense fontigitaj aŭ simple t.n. ĝerموj.

WikiTrans tradukoj estas altkvalitaj maŝintradukoj, uzantaj regul-bazitan sistemon, [GramTrans](#), kiu kombinas profundan lingvistikan analizon ([Constraint Grammar](#)) kun kontekstdependaj tradukreguloj. Kaj la daŭra evoluigo de la MT-sistemo kaj la fakto ke Vikipedio-artikoloj konstante estas aktualigataj, necesigas laborplanon kun regulaj ĝisdatigoj. Tiel novaj artikoloj tradukiĝas post apero, kaj malnovaj tradukoj refariĝas en intervaloj de kelkaj monatoj.

Ĉar eĉ multaj originalaj Vikipedio-artikoloj en malgrandaj lingvoj kreiĝas parte per tradukoj aŭ almenaŭ inspiroĝas per artikoloj en pli granda lingvo, aŭtomata tradukado devus faciligi la laboron de Vikipedio-aŭtoroj kiuj strebas mallarĝigi la kvantan kaj kvalitan distancon inter siaj lingvoj kaj la angla ĉef-Vikipedio.

En la tradukita materialo de la WikiTrans-retejo (do [epo.wikitrans.net](http://epo.wikitrans.net) por Esperanto), eblas paralele serĉi kaj la esperantan kaj la anglan kapvortojn. Aldone, la Lucene-bazita serĉinterfaco kapablas trovi - kaj ordigi - plentekstajn trafojn, ilustrante ilin per teksteroj. Disambiguado de plurobla kapvorto estas kromefiko de tio, kaj ne necesas plusendo-paĝoj por sekundaraj aŭ sinonimaj esprimoj, kiujn plejparte facile trovas kaj religas jam la normala serĉilo.

La unua fazo de la WikiTrans-projekto okupiĝis pri la Esperanto-tradukado de la 100.000 plej ofte uzataj anglalingvaj artikoloj, kaj la unua tradukorondo kompletiĝis la 15-an de marto 2010. La aktuala dua fazo celas vastigi la unuan tradukrondon al 3 milionoj da artikoloj, kun paralela konstanta plibonigo de la traduksistemo.



Sen reviziado aŭ reverkado, WikiTrans-artikoloj kompreneble simple restas tradukoj, kaj kvankam ili ne estas citaĵoj en la strikta senco de la vorto, ili retenas la saman enhavon kaj aŭtoreco-historion kiel la origina angla [Wikipedia](#) artikolo. Tial, bone-malbone, WikiTrans-artikolo elmontras la samajn fortojn kaj malfortojn, kvalitojn kaj erarojn kiel la originalo. Ankaŭ necesas atentigi, ke la tradukoprocezo mem foje enkondukas kelkajn ambiguaĵojn aŭ eĉ erarojn. Kvankam tiaĵoj estas maloftaj kaj kutime perkontekste travideblaj por la homa leganto, vi ĉiam trovos ligan al al originala artikolo tuj apude, por komparo.

*Eckhard Bick*

## BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO

En Antvervpeno en majo okazis la tritaga Beneluksa Kongreso, kiu arigis ĉirakaŭ cent dek partoprenintojn. ILEI engaĝis sin signife en la programo, gvidinte la interkonan vesperon kiu konsistis ĉefe el partopreniga kvizo pri la ligo kaj instruado. La programo inkluzivis fakan prelegon de Katalin Kovats pri la eŭrop-konformaj KER-ekzamenoj, la lastaj evoluoj ĉe [edukado.net](#), diversaj kursformoj, inkluzive de 45-minutaj orientigaj fulmkursoj kaj la programoj por instruista trejnado, ĉefe ĉe Poznan, sed baldaŭ suplementita per reta kurso. En ĉiuj tiuj iniciatoj ILEI proksime kunlaboras. Aldone al tio ILEI skizis la situacion ĉe siaj najbarlandaj sekcioj finante per la bezono trovi novan sekciestron por la belga sekcio. Malgranda membrokunveno sekvis post la ĉefa prelego, kie oni diskutis pri la ebloj reenkonduki oficialajn kursojn en Belgio, kiel okazis dum pluraj pasintaj jaroj. Fine, inter la kunsidintoj unu anoncis sin deĵorpreta, la kunvenintoj akceptis tion kun ĝojo, do post plia konsultiĝo kun la ceteraj nunaj sekcioj membroj, ni devos esti en pozicio anonci novan sekciestron, kiun konfirmu la sekva sekcia jarkunsido.

La cetera programo estis bunta, kun tuttaga lingva festivalo malferma al la publiko, pluraj prelegoj kaj vasta ekskursiva oferto. Koncertis la nederlanda trupo Kapriol'.

Ĉeestis tra la tuto la ILEI-prezidanto, kune kun du pliaj estraranoj parttempe. Zsófia Korody kun grupo el Herzberg cheestis kaj prezentis la centron, kune kun ĝiaj kunlaboraj programoj kun ILEI - specife la seminario pri subvencipetado, kiu okazos tie oktobre. Nia kasisto Julija Batrakova ĉeestis dum unu tago, do multaj praktikaj estraraj temoj estis diskutitaj - precipe pri la financoj kaj la perspektivo por honorariataj kunlaborantoj por altigi la agadnivelon de la ligo.



Sekve, bonetosa ariĝo de esperantistoj, kaj tre produktiva semajnfino.

*Stefan MacGill*

Prezidanto, ILEI

## Informado en Esperanto pri aktualaĵoj en la Eŭropa Unio

En la unua duono de la jaro 2011 Hungario plenumos prezidadan taskon de la Eŭropa Unio. En 2010 tiajn taskojn plenumas Hispanio kaj Belgio. Ĉi tiuj tri landoj formas triopon por komune kunordigi la ĉefajn celojn

kaj taskojn por unu kaj duona jaroj. En Hungario kelkaj iniciatemaj kaj influhavaj civilaj organizoj kunlaboras por influante helpi registaran prepariĝon al la prezidado. Tiu ĉi malfermita civila laborkomitato en 2008 proponis al la Ministerio pri Eksteraj Aferoj iaspecan kunlaboron, en kies kadro civilaj organizaĵoj unuflanke informiĝas pri la ĉefaj politikaj farenadoj, aliflanke ili prezentas ideojn, emfazas civilajn interesojn al la politiko.

Ankoraŭ en decembro 2008, okaze de konferenco, kiun komune organizis la menciita ministerio kaj la civila laborkomitato, la Hungaria Esperanto-Asocio faris proponon je la kunlabora partopreno per informado en Esperanto. La organizantoj akceptis la proponon. En 2009 okazis pluraj laŭtemaj civilaj kunvenoj, kiujn ĝenerale partoprenis ankaŭ esperantistoj, same kiel konferencon en januaro 2010. La esperantlingva informado komenciĝis helpe de retpaĝo [www.vilagnyelv.tripod.com](http://www.vilagnyelv.tripod.com). Konsidere la enhavon en ĝi temas pri esencaj informoj pri oficialaj dokumentoj, pri laŭtemaj kunvenoj de civilaj organizaĵoj, pri novaĵetoj. Indas apartan mencion la konigo pri la formiĝo de la Danubo-regiona Strategio, kies celo estas certigi pli grandan prosperon, sekurecon kaj pacon al la civitanoj en la areo de tiu makroregiono.

Ĉi tiu strategio verŝajne povos alpreni kaj apogi esperantistajn iniciatojn kaj kunlaborojn. Similan, ekzemple, kia estis antaŭ jardeko dum kelkaj jaroj la Danuba Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo (DESKF), sed tiam ne havanta eblon por oficiala apogo.

**László Gados**

kozosnyelv@t-online.hu

## **FRANC-GERMANA E-KONGRESO EN KAISERSLAUTERN**

Vendredon la 21an de majo 2010 malfermiĝis la Franc-Germana Kongreso de Esperanto en Kaiserslautern, kiu daŭris ĝis lundo plus tuttaga ekskurso mardon.

Aliĝis pli ol 250 personoj el 10 landoj, ĉefe francoj kaj germanoj.

Pluraj asocioj, ĉu regionaj, ĉu fakaj, sin prezentis dum la vendredvespera Movada Foiro: kulturcentroj (Grésillon, ICH Herzberg, Kvinpetalo), revuo Esperanto-Info, OSIEK, Interkant', la francaj esperanto-instruistoj GEE kaj la germanaj AGEI, revuoj Le Monde Diplomatique en Esperanto, Le Monde de l'Espéranto (revuo de UFE), SAT, UEA, kaj ankaŭ kelkaj regionaj kaj fakaj asocioj, politikaj movadoj (EDE, UM, AVE)

La programo de la kongreso estis aparte densa.

La kongresanoj ne havis tempon por enui,

inter vizitoj tra la urbo (urba gvidado, turo de Humberg, Japana

Ĝardeno), Tuttaga ekskurso al Idar-Oberstein, la urbo de la valorŝtonoj,

muzikaj vesperoj (folkloro balo kun Kapriol', Gijom Harmide, Kanto

Ĝenerala far la koruso Interkant'),

Afrika Forumo

kaj certe fakaj kunsidoj kaj prelegoj.

EEU havis sian Jarĉefkunvenon, jam vendredon. Same kiel GEA kaj UFE, dimanĉon.

Ĉiuj informoj pri la Kongreso troveblas en la retejo:

<http://esperanto.de/gea/GEK2010.htm>

**Aleks Kadar**

## VIRTUALA RENKONTIĜO DE INFANOJ LERNANTAJ E-ON

En tiu ĉi lernojaro ni en la baza lernejo Janko Glazer en Ruše (Slovenio) efektivas eksperimentan projekton pri instruado de Esperanto. Esperanton lernas infanoj en infanĝardeno (5- kaj 6-jaraj) kaj en la unua klaso de la baza lernejo (6- kaj 7-jaraj). Simila projekto okazas ankaŭ en Britio en The Vine Inter-Church Primary School, kiun gvidas sinjoro Tim Morley. Ni proponis al li praktikan kunlaboron. Ĉu iliaj infanoj volas renkonti virtuale niajn infanojn? En tio helpis nin la programo skype kaj la lerneja komputilo.



La renkontiĝo de niaj du grupoj kun lia grupo okazis la 20-an de majo 2010. Inter la infanoj fluis interesaj konversacioj/dialogoj.

Ekzemple:

Saluton, kiel vi fartas? Mi fartas bone, dankon.

Kiel vi nomiĝas? Mi nomiĝas Lara.

Kiom aĝa vi estas? Mi estas kvinjara.

Ĉu vi havas gefratojn? Mi havas unu fraton kaj unu fratinnon.



Ambaŭ kantis: slovenaj infanoj kantis »Ruĝaj ĉerizoj« en Esperanto kaj en slovena lingvo. La anglaj kantis »Kapo, kolo, naz', ore!«.

Por niaj infanoj tiu aranĝo signifis, ke ili ekkonis kelkajn novaj infanojn kun interesajn homojn kaj ankaŭ, ke aliaj infanoj parolas Esperanton. Konklude mi devas diri, ke tio estis tre bona sperto por la infanoj. Nun ili havas senton, ke ili povas paroli kun aliaj, ne nur lerni en lernoĉambro. Ankaŭ la direktorino de la lernejo estis ege kontenta.

Mi ankaŭ devas gratuli kaj danki al la angla instruisto Tim por lia kuraĝo kaj bona prezento.

*Karmen Lešnik*

## HUNGARAJ INFANOJ VIZITIS FRANCION

La Kalvina bazlernejo "Bán Zsigmond" en Tiszafüred (Hungario) partoprenas Komenius-projekton de 2009 kun bulgara, franca kaj pola lernejoj. Nun okazis la dua renkontiĝo en Francio, Lyon. Jen la raporto pri ĝi.

Jen partoj el la taglibro:

### La tria tago

Nia tago frue komenciĝis, post abunda hotela matenmanĝo kaj post unuhora urba trafikado (Lyon estas la dua la plej granda urbo de Francio, kompreneble ĝi havas iomete kaosan trafikon...) ni atingis tiun francan eksterurban lernejon, kie lernis niaj francaj projektpartneroj. Ĉi tie, post mallonga salutado ni grupiĝinte vizitis la lernejklasĉambrojn, kie ni partoprenis diversajn lecionojn. Estis tiuj kiuj vizitis matematikan, germanlingvan, literaturan aŭ kemian lecionon. Poste, laŭ la projektprogramo, sekvis la prezentado de bulgario kaj poloj pri iliaj landoj en la XIII-a jarcento. Estis interese aŭdi, ke ambaŭ landoj havis rilaton historian kun tiutempa Hungario.



Por tagmanĝi ni devis dek minutojn promeni (samtempe la francoj veturis per buso al la lerneja restoracio). Post tagmanĝo per luita buso ni vizitis historiecan urbeton, konstruitan en la XIII-a jarcento. Tie ni povis gustumi lokan dolĉaĵon: sukeran „picon”. Reveninte al la franca lernejo estis interesa okazaĵo ke ni solaj devis hejmenveturi tra la urbego al nia hotelo, sed la geknaboj ege ĝuis la trafikadon kaj per metroo kaj per busoj.

La vespero bonetose pasis, ludante en la ĉambroj de hungaroj, ni instruis hungarajn kartludojn al bulgario kaj poloj. Kompreneble kaj dumtage kaj dumvespere niaj geknaboj havis eblon ekzerci kaj Esperantan, kaj la germanan kaj la anglan lingvojn por komuniki unuj kun la aliaj.

### la kvara tago

El la hotelo, antaŭtagmeze per metroo ni veturis al la urbocentro, kie ni povis admiri la historian parton de la urbo, interalie ni vizitis la urbodomon ĉe Place des Terreaux, la faman Notre Dame de Fourvière, ni rigardis belegajn skulptaĵojn, pentraĵojn en Belarta muzeo, kiu havis ankaŭ egiptan ekspozicion kaj ni promenis (bedaŭrinde en pluvado) en la historiaj, mallarĝaj stratetoj. Fine, posttagmeze ni povis admiri ankaŭ la plej modernan parton de la urbo, ni havis eblon aĉetadi en la plej granda supermerkato en la urbo kaj eble en Eŭropo, ĉe metrostacio GARE DE PAR DIEU.

### la kvina tago

Post matenmanĝo kaj unuhora busveturado denove en la franca partnerlernejo ni havis programon: miksinde la geknabojn kaj plenkreskulojn ni devis solvi diversajn taskojn en diversaj lokoj. Nun la infanoj certe devis uzi sian lingvokonon, ja estis tiu grupeto kiun tute ne helpis la instruistoj, la infanoj MEM devis komuniki kaj kompreni kion fari. La ĉefa tasko estis ke oni devis montri al aliaj (ĉefe al francaj geknaboj kaj instruistoj) sian landon, kutimon, lingvon.

Poste sekvis la franca kaj hungara prezentado pri la XIII-a jarcento. Mi devas diri ke la nuna renkontiĝo en Lyon havis du farendajn taskojn: en unu temis pri la XIII-a jarcento. En la alia estis prezentado de Eŭropa Unio, ja la 9-an de majo oni festis la Tagon de Eŭropa Unio. En la projekto la partoprenantoj plenumis tiun taskon ankoraŭ lunde, bedurinde la hungara grupo ankoraŭ tiam estis survoje en Italio. Sed kompreneble ankaŭ nia grupo faris sian prezentadon en PPs-formo (la geknaboj mem kompilis la PPS-formon sen instruista helpo, kiel formiĝis EU, kiuj estas anoj de EU ktp.), kaj tion ni poste alligos al la projekto.



Posttagmeze ni havis iom da tempo promenadi en la ĉirkaŭaĵo kaj iom aĉetadi por niaj familianoj kaj je la 18-a horo sekvis la vespera kultura programo, kiun malfermis danco de francaj infanoj. Ilin sekvis junaj francaj kantistoj, muzikistoj, eĉ la lerneja orkestro prezentiĝis.



Fine de la programo nia lernantino Vivien Farkas ventrodancis, kio estis neatendita programero, sed al ĉiuj ege plaĉis kaj la publiko longe aplaŭdis. Post Vivien ni kune kantis himnon de EU en Esperanto.

La programon sekvis abunda vespermanĝo, kie ni povis paroladi kun la estraranoj de la lernejo kaj esperantistaj klubanoj de Lyon. Intertempe ankaŭ geknaboj denove povis miksite ludi, babili unu kun la alia. La tiel nomata „hungareska fino” – komuna kantado, dancado ne okazis, sed iom ni povis amuziĝi kun la bulgaraj junuloj en la hotelĉambroj iom kantante kaj kartludante.

la sesa tago

Por la hungaroj tio estis la adiaŭa tago, sed antaŭtagmeze ankoraŭ kune la partoprenantoj povis viziti dum tri horoj la urban Zoo-, botanikan kaj naturparkon, kie ni futbalis en internacia etoso, (kie la hungara lernejo atingis la plej gravan internacian futbalsukceson de nia lernejhistorio: la maĉon gajnis la hungaroj(6 ludantoj) kontraŭ la francoj(10 ludantoj) je 12: 5!), aliaj promenante fotis la belegajn vegetaĵojn, plantojn, bestojn, birdojn de la parkego.

Kvankam post pli ol 3200km ni ĉiuj estis lacaj, neniuj sentis sin malĝoja pro la laciga veturado, ja ni havis tiun eblecon dank'al la projekto kaj Esperanto, kiun nur malmultaj geknaboj povas sperti. Ni ĝoje atendas nian sekvan projektrenkontiĝon, kiu okazos aŭtune 2010 en nia urbo, Tiszafüred!

*Julianna Vas-Szegedi*

## **Eŭropa Bulteno. 2010. N° 5 (94)**

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita:** 2010-05-30.

**Redaktoro:** *Zlatko Tišljar*

**Kunlaborantoj:** *Aleks Kadar, Eckhard Bick, Julianna Vas-Szegedi, Karmen Lešnik, Lu Wunsch-Rolshoven, László Gados, Neil Blonstein, Stefan MacGill*

**Teknika redaktoro:** *Raymond Gerard*

**Leterojn kaj komentojn sendu al EEU:**

**Rete:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

<http://www.gazetejo.org>

## Ligiloj

- [beta.visl.sdu.dk/constraint\\_grammar.html](http://beta.visl.sdu.dk/constraint_grammar.html)
- [edukado.net/](http://edukado.net/)
- [en.wikipedia.org/wiki/Sam\\_Green](http://en.wikipedia.org/wiki/Sam_Green)
- [eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:%C4%88io](http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:%C4%88io)
- [eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Konkurso](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Konkurso)
- [eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Listo\\_de\\_havendaj\\_artikoloj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Listo_de_havendaj_artikoloj)
- [epo.wikitrans.net/browse/](http://epo.wikitrans.net/browse/)
- [esperanto.de/gea/GEK2010.htm](http://esperanto.de/gea/GEK2010.htm)
- [gramtrans.com/](http://gramtrans.com/)
- [meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias)
- [meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_language\\_family](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_language_family)
- [meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles)
- [meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles/Growth#eo\\_Esperanto](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles/Growth#eo_Esperanto)
- [meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_speakers\\_per\\_article#cite\\_note-et-0](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_speakers_per_article#cite_note-et-0)
- [vimeo.com/10903101](http://vimeo.com/10903101)
- [wikipedia.org/](http://wikipedia.org/)
- [www.epo.wikitrans.net/](http://www.epo.wikitrans.net/)
- [www.esperantic.org/](http://www.esperantic.org/)
- [www.gazetejo.org/](http://www.gazetejo.org/)
- [www.rojoynegro.info/2004/IMG/pdf/Proposta\\_de\\_resolucio - esperanto.pdf](http://www.rojoynegro.info/2004/IMG/pdf/Proposta_de_resolucio_-_esperanto.pdf)
- [www.vilagnyelv.tripod.com/](http://www.vilagnyelv.tripod.com/)
- [www.wix.com/dtislar/europo](http://www.wix.com/dtislar/europo)

Notu ke en PDF dokumento, kelkaj ligiloj ne funkcias kiel atendite.

Vi devos mem kopii kaj glui la ligilon en vian krozilon,

En HTML-dokumentoj, ĉio funkcias bone.